Kongresa rezolucio de la 65a Internacia Junulara Kongreso de TEJO 2009 en Liberec'

Aprobita de la Komitato de TEJO la 24an de julio 2009

20 jarojn post la falo de la Fera Kurteno, la baroj inter la homoj ankoraŭ ne estas for: Falis la fizikaj kaj ideologiaj muroj, sed restis kaj kreskas aliaj baroj. Naciegoisma pensmaniero, nutrata de malnovaj ŝovinismo kaj antaŭjuĝoj, kaj lingvaj baroj malhelpas al interhoma kompreniĝo trans la limoj lingvaj, naciaj kaj popolaj.

En la urbo Liberec (Ĉeĥio) kunvenis 300 junuloj el 40 landoj okaze de la Internacia Junulara Kongreso. 300 junaj homoj plej diversaj laŭ nacio, religio, lingvo kaj politikaj opinioj pere de la Internacia Lingvo Esperanto diskutis la temon *Libereco 20 jarojn post la falo de la fera kurteno* kadre de diskutrondoj, prelegoj kaj seminarioj.

Dum unu semajno ni festis niajn kulturojn lokajn kaj internacian. Tiel ni spertis pliriĉigon de niaj propraj kulturaj horizontoj pere de interŝanĝo kaj interago. Ni spertis ankaŭ, ke kulturo kaj identeco estas homaj ecoj tro valoraj kaj kompleksaj por esti karakterizitaj nur per nacia aparteno.

La partoprenantoj de la Internacia Junulara Kongreso travivis semajnon plenan de pliriĉigaj spertoj. Dum la semajno ni konatiĝis, amikiĝis, interdiskutis en internacia kaj plurkultura etoso, egalece kaj tute senzorge pri iu tielnomata *artefariteco* de nia Internacia Lingvo. Niaj amikaj ligoj, niaj kulturaj valoraĵoj, niaj komunaj sentoj ja estas veraj kaj vivaj.

Spertante unu semajnon kiel en monda vilaĝo, la partoprenantoj komunikis facile kaj egalece. Surbaze de diskutrondoj kaj seminarioj pri libereco evidentiĝis io dirinda kaj pripensinda: Ni konkludas, ke libereco havas multajn vizaĝojn kaj aspektojn. Libereco ankaŭ signifas ke ĉiu havas la rajton elekti kaj krei siajn proprajn identecojn – identecojn, kiuj reprezentas la individuon kaj ne nepre popolon aŭ nacion.

La Komitato de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.